JARO IIIa/VIIa. № 4 APRILO 1928

ESPERANTO-LINGVA RESUM-FOLIO DE

# LA VOJO DE KLERIGO

MONATA PEDAGOGIA REVUO

ШЛЯХ ОСВІТИ
ПУТЬ ПРОСВЕЩЕНИЯ

Organo de la Ŝtata Scienca Metodologia Komitato ĉe la Popola Komisario por Klerigo de l'Ukraina Socialista Sovet-Respubliko

Redaktejo kaj Administrejo: K. Liebknecht-str., 31 — Ĥarkov — Ukrainio — USSR

№ 4 (72) de „La Vojo de Klerigo" enhavas 63 artikolojn k notojn sur 244 paĝoj.

## ĜENERALAĴOJ

M. O. Skripnik. Stato k perspektivoj de l'ukraina kinematografio. La artikolo prezentas paroladon de l'popola komisaro por klerigo ĉe tutukrainia konfero pri kino. Konstatante rimarkindajn progresojn direkte al interligo de l'kino kun la tuta politik-kleriga agado, la aŭtoro akcentas la neceson plue zorge gvidi la kino-laboron, korektante la erarajn tendencojn. La temaro k scenaroj devas korespondi kun la bezonoj de l'laborula klaso; la kino-reĝisoroj, aktoroj, arkitektoj k a. kinolaborantoj estas zorge selektendaj k edukendaj; atentenda estas la problemo pri taŭga muzik-ilustrado de l'filmoj; estas organizenda marksisma kino-recenzado k -kritikado kun altiro de l'masoj; la reto da kinejoj devas kreski k necesas konstrui kino-palacojn kiel kultur-edukejojn. La soveta kino celu ne komercan sed kulturan profiton. La ukrainia kinoproduktado ne devas limizi sin per nacia temaro, sed havi pli larĝan proletecan temar-amplekson. La sindikataj kluboj devas pli zorgi pri aranĝo de siaj kinejoj. Estas organizenda Tutukrainia Amikaro de l'Soveta Kino por entiri vastajn masojn al aktiva partopreno en la kinolaboro sub la gvido de l'Narkompros k de l'Kom. Partio. Kino devas fariĝi gravega instrumento de proletkulturo.

V. Herŝelman. Niaj superlernejoj k defendo al USSR. La sovetia civitanaro devas atente observadi la altan nivelon de l'okcidenta milittekniko k zorge prepari sin por eventebla defendo de l'laborula Sovet-Unio. Gravega rolo en ĉi-defendo-preparo apartenas al la superlernejoj, kiuj devas formadi altekvalifikitajn specialistojn pri iu civila fako k samtempe—pri analoga, ligita kun la lasta, milita fako; tio koncernas ne nur virojn, sed anke hominojn, kies helpa rolo (prisana laboro, propagando ktp.) en la milito estas granda. La aŭtoro detale priparolas la organizon, programojn k metodojn de supera antemilita preparo kiel intergranta parto de l'superaj studoj. La tuta laborula loĝantaro kiel bone preparita militrezervo—jen garantio por nevenkeblo de Sovetio.

## METODOJ POR KLERIGA LABORO

V. Jastrĵembski. Kino kiel instru-helpilo en la pedagogia procedo. Sovetio decide starigas ant si la problemon pri enkoduko de kino en la mas-lernejon. Tial gravas nun profunde pristudi la edukadan, precipe la metodan, flankon de ĉi-problemo por ellabori praktikajn direktivojn. La aŭtoro montras la grandan valoron de kinofilmoj por la kompleksa instruado k priparolas la enhavon de la produktendaj filmoj por diversaj studo-jaroj konforme kun ties programoj. Pritraktante plue la fiziologian efikon de kino je l'infanoj, li atentigas pri la danĝeroj evitendaj k citas sugestojn bazitajn sur eksterlandaj spertoj. Fine, en la ĉapitro pri metodologio k didaktiko de l'instru-eduka laboro kun la helpo de kino, estas tuŝataj la problemoj pri 1e — karaktero de l'instru-filmo, 2e —aranĝo de l'kinejo, 3e — konstruo de l'kino-leciono; citante la ĉi-rilatajn okcidentajn spertojn, la aŭtoro notas la specifecon de l'sovetiaj cirkonstancoj, kie la afero estas nur komencata. Praktikaj eksperimentoj k sciencesplora laboro ĉi-rilata solvos la problemojn starantajn ĉe la realigo de ĉi-nova laboro en la soveta lernejo.

V. Pomahajba. La procedo de akiro de formalaj scioj en la laborlernejo (Fino—v. № 2-3). Daŭrigante sian studon, la aŭtoro detale parolas pri la momento de aŭtomatigo, distingante a. de sciencaj scioj k a. de socilaboraj teknikoj: ĉe la una partoprenas la asociado-centroj k restas konscia akto, dum la dua celas tute malŝarĝi la asociado-centrojn. Rilate la unan kelkion

donas la eksperimenta psikologio, multe pli—la lerneja empirio; rilate la duan—multon imitindan prezentas la spertoj el Usono; analizante ĉion-ĉi, la aŭtoro formulas siajn praktikajn sugestojn. La aŭtomatigon daŭrigas la akto de utiligo de l'akirito, precipe atentata en la socia pedagogio k praktikata en la soveta laborlernejo: utiligo senpere porproduktada, perspektive-porproduktada k por formi la mondokoncepton. Sistemizo de l'akirito, faciliganta la studojn k la postan eluzon de l'akirito, estas la lasta momento en la pedagogia procedo.— Fininte la ekspozon de sia skemo, la aŭtoro tuŝas la demandon pri materialo k pri metodoj konformaj kun ĉiu el la priparolitaj momentoj de la pedagogia procedo k fine li atentigas pri la granda rolo de emocoj k instinktoj de l'infano. Li konkludas, ke necesas profunde studi—por raciigi ĝin—la organizon de l'pedagogia procedo bazita sur kompleksa instruado.

## KLERIGA PRAKTIKO

D. Elkin. Kino k infanoj. La aŭtoro enketis per speciala demandaro 1074 infanojn 8—16 j. en Odessa, celante esplori la influon de l'kino je ili. El la rezultoj de tiu enketo, kiujn prezentas la artikolo, estas citenda: $1^e$ —Nur esceptaj infanoj ($4^0/_0$) ne ŝatas kinon. $2^e$ — La ofteco de l'kino-frekventado dependas de la aĝo: 8—10-j.—meze 1,8-foje semajne, 11—13-j.—1,3-f., 14—16-j.—1 f., knaboj—pli ol knabinoj; la plejmulto ($75^0/_0$) da kinej-vizitoj okazas vintre. $3^e$ —La intereso al kino estas grandega: entuziasme la demanditoj rakontas pri l'viditaj filmoj ($33^0/_0$ ŝatas ĉiam konversadi pri tio). $4^e$ —Preferas kinon ol teatron: $67^0/_0$ el la 8—10-j., $68^0/_0$ el la 11—13-j. k $63^0/_0$ el la 14—16-j. $5^e$ —La plejmulton ($58^0/_0$) interesas artifikozaj filmoj, la duan lokon okupas revoluci-temaj filmoj; dramaĵoj interesas plejparte 14—16-j., precipe knabinojn; $8^0/_0$ plej ŝatas komikaĵojn; nur $6^0/_0$ interesas sciencaj filmoj k $2^0/_0$—filmoj dekore-allogaj.

Robert Geley. Profesia orientado k lernejo en Francio (Fino—v. № 2-3). Daŭrigante sian studon, la aŭtoro prezentas la franciajn realigojn rilate p. o. k speciale priskribas tri formojn: 1) antelernado primetia en elementaj lernejoj, 2) metiejoj-lernejoj preparantaj al metilernado, 3) oficejoj por p. o. La una ekzistas precipe en Paris, kie en ordinaraj elementaj lernejoj estas organizitaj specialaj klasoj por infanoj 11—14-j. ne ŝatantaj la komunajn studojn; ĉi-infanoj pasigas parton de sia lerno-tago en lerneja metilaborejo k estas inicataj pri laboroj el ligno, fero ktp.; la rezultoj de tia aktiva, viveca laborlernejo estas valoraj kiel por la p. o., tiel anke rilate ĝeneralan edukadon. Al la metiejoj-lernejoj (dume tre malmultaj) estas akceptataj 13—16-jaruloj k post lastudoj (ĝeneralaj k specialaj) ili ricevas laboron pagatan ĉe industria entrepreno. Oficejoj por p. o. funkcias en ĉiuj departamentoj; ili konsistas el fakuloj k reprezentantoj de interesataj org-aĵoj k gvidas la tutan lokan laboron por p. o. En sia konkludo la aŭtoro konstatas la neceson de tri fazoj en la p. o.: $1^a$ —preorientado kun observadoj k notoj en la elementa lernejo; $2^a$ — p. o. propradire, provo de kelkaj metioj; $3^a$ —metodeca ellerno de certa metio elektita. Kulturo k profesio, edukado k produktado devas esti intime interligitaj, k p. o. devas fariĝi ilia interligilo.

## VIVO DE KLERIGO

I. Kosman. Klerigo de l'laborist-kamparula junularo k la rolo de l'ukrainia Komsomol en ĝi. La Komsomol (Komunista Junular-Ligo) ludas gravan rolon en la kulturkonstruado. Ĝi organizas la laborjunularon por persista studado celanta formi avangardon en la socialismo-konstruado. La plej granda estas la aktiveco de l'K. J.-L. sur la kampo de laborista instruado; pri tio atestas: 162 fabrik-lernejoj, 54 trasport-l. k 17 minej-l. kun pli ol 25.000 lernantoj; plua progresado de ĉi-lernejoj, reviźo de ilia aranĝo k ties adapto al la bezonoj de l'rekonstruata k raciigata industrio; senĉesa perfektigado de l'laborinstruaj metodoj; preparo de kvalifikitaj instruistoj por f.-l.; aranĝo de 7-jaraj ĉefabrikaj elementaj lernejoj kiel bazo por la fabrik-lernejo; 65 profesi-teknikaj kursoj kun ĉ. 10.000 lernantoj, 15 vesperaj laboristaj fakultatoj kun 2.343 l., 14 lab. teknikumoj kun 3.010 l., 24 noveorganizitaj vesp. lab. prof.-tekn. lernejoj; kresko de l'influo de la K. J.-L. en ĉiuj profesi-lernejoj (13—$40^0/_0$ el ties tuta lernantaro); multegaj rondetoj por studoj sciencaj, teknikaj, industriaj, ekonomiaj k. a.; pliperfektigo de la gvid-organizo k eldono de speciala revuo por laborista instruado. Grandaj estas la realigoj anke rilate kamparjunularan klerigadon: 250 lernejoj de kampar-junularo k agronomizitaj sepjaraj ele-

mentaj lernejoj; vesperaj kampar-junularaj lernejoj; stud-metiejoj en vilaĝoj; 170—180 vintraj agrokulturaj kursoj; rondetoj por hejmmastrumaj k. a. studoj; kampar-ekonomiaj stud-konferoj; kampar-ekonomiaj lernejoj; speciala revuo por kampar-ekonomia instruado. Laŭgrade la K. J.-L. penetras anke la superajn lernejojn, kie ties membraro atingas 13—41% el le tuta studantaro k grave influas. Fine, la K. J.-L. aktive partoprenas la organizon de universala elementa instruado. Ĝenerale, ne ekzistas branĉo de l' kleriga agado, kiun ne penetris la Komsomol.

I. Bilecki. Vintraj kampar-ekonomiaj lernejoj por adoltuloj en la regiono de Poltava. Ekzistas 7 tiaj lernejoj kun 242 studantoj 20—45-jaraj. La lernejoj estas organece ligitaj kun la kampara vivo; ilia ĉefa-studobjekto estas certa socia grupo (ne individua mastrumado) kun aparta atento al ekonomio k organizo de l'vilaĝa mastrumado. Per sia praktika socia, politika k agrokultura laboro ĉi-lernejoj atingis grandan influon en la vilaĝoj. La aŭtoro donas ne nur ĝeneralan bildon, sed anke priskribas apartajn lernejojn. Estas atentinda sukcesa aranĝo de hejmmastrumaj fakoj por kamparulinoj. Necesas prepari kvalifikitajn gvidantojn por tiaj lernejoj.

M. Miĥalovski. Plilarĝiĝita plenkunveno de l'distrikta metod-komitato en Odessa. La kunveno okazis 29.III.—2.IV. k okupis sin pri problemoj de soveta lernolibro. La loka instruistaro aktive partoprenis la debatojn sekvintajn ĝeneralan raporton, kie estis analizita la nuna stato de l'afero k formulitaj la novaj postuloj; 7 sekcioj detale pritraktis specialajn problemojn pri apartaj lernolibro-tipoj. La diskutoj estis tre viglaj k montris grandan opinidiversecon ĉe l'partoprenintoj. Tamen fine komunaj konkludoj estis atingitaj k formulitaj kiel deziresprimoj: krei novan lernolibro-tipon — „labor-libron", altiri lokajn (periferiajn) spertulojn al lernolibro-verkado, pliigi art-materialon en legolibroj, singarde apliki „fuzionismon" en matematiko-lernolibroj (senrezerve akcepti ĝin nur por elementa instruado) ktp. La kunveno pruvis la utilon de kunlaboro de la centraj k periferiaj metodistoj.

## LINGVO K LITERATURO EN LERNEJO

E. V. Trocjuk. Organizo de literaturo-studoj en laborlernejo. La o. de l.-st. en l.-l. estas intime ligita kun la tuta organizo de l'lerneja instruado—jen la deira tezo de l'aŭtoro, kiu plue karakterizas la pozicion de l.-st. en la sovetia lernejo (kp. art. de Ivanica—№ 11/1927), detale k kritike analizas la oficialajn programojn, montrante ties mankojn, k formulas la jenajn sugestojn: 1e — l.-st. estu memstara fako, ne ilustra elemento en sociscienca studoj; 2e — ili celu edukon de klaskonscio k scienca marxisma mondokoncepto — unuparte k minimume necesan formalan instruon pri literaturo—aliparte; 3e — rekonstrui konforme kun tio la lit.-kurson por ke ĝi donu la ĝeneralan bildon de l'literaturevoluo depende de l'evoluo ekonomia k socia; 4e — adapti la l.-st. al la lerneja praktiko per fikso de l'horaro k zorga aranĝo de l'programoj; 5e — eldoni specialajn seriojn da elektitaj verkoj k labor-libroj por l.-st.; 6e — kunmeti listojn de minimume-necesaj verkoj por memstara legado por ĉiu studo-jaro; 7e — asekuri necesan metod-literaturon por instruistoj; 8e — kunordigi la l.-st. kun la lingvo-studoj. Ĉiuj-ĉi deziresprimoj estas bazitaj sur praktikaj spertoj.

Prof. A. F. Muziĉenko. Legado k vort-kulturo en la nuna lernejo. Lingvo-formado estas hom-formado — tia estas la ĉefa tezo, kiu determinas la metod-pozicion de l'aŭtoro. Analizinte la modernajn tendencojn en lingvo-studoj, li konstatas, ke eĉ en Germanio, la plej progresinta ĉi-rilate, la novaj metodoj de kulturado de l'gepatra lingvo restas tasko nesolvita. De prilingva instruado li vokas al lingvo-edukado. Ne historio, sed mekanismo de l'vivanta lingvo estu la ĉefa studobjekto. Tuŝinte plue la dependon de la lingvostudaj metodoj de la tuta edukado-sistemo, li monisme solvas la ĉefajn instru problemojn k konceptas didaktan materialismon k formalismon kiel du flankojn de uneca instru-procedo. Poskiam la fundamentaj nocioj estas donitaj al la infanoj, la lastaj devas mem per observado, komparado k meditado akiri k fiksi por si novajn sciojn; la instruisto devas krei tiajn kondiĉojn, ke la lernanto mem sentu bezonon serĉi ĉi sciojn en la donitaj vivonodoj. La aŭtoro elokvnete ekspozas ĉiujn-ĉi ideojn k pruvas ilin per perfektaj ekzemploj el siaj abundaj praktikaj spertoj. Plue estas priparolata la didakta prilaboro de l'materialo konsistanta el tri stadoj: 1a — la infanoj ellaboras planon kondukontan al la celo; 2a — la infanoj selektas materialon konforman kun la

fiksitaj taskoj; 3a — la infanoj prilaboras — laŭ certa metoda tekniko — la materialon por elĉerpi novajn sciojn. Profundaj metodsugestoj kaj praktikaj ekzemploj, montrantaj la teknikon de l'lingvo-kulturado en la lumo de la ĝenerala edukado procedo k la ŝtupojn de l'stud-laboro, akompanas la ekspozon. (Finota).

Prof. L. Bulaĥovski. Preparo de lingvo-instruisto. La l.-i. devas posedi sufiĉan lingvan materialon, sciojn pri lingvoscienco k najbaraj sciencoj, pri modernaj instrumetodoj ĉi-fakaj ktp. por ke li havu larĝajn sciencajn k metodajn interesojn k kapablu kritike rilati al la faka literaturo k memstare aktive organizi k gvidi sian kurson. Tial do la programo por la studoj de l'futura l.-i. devas minimume ampleksi: ukrainan k rusan lingvojn, enkondukon al komparaj studoj pri slavaj lingvoj, ĝeneralan lingvosciencon, modernan lingvon, metodikon por lingvo-instruado, teknikon de parola k skriba lingvo. Detale priparolinte tiun programon, la aŭtoro aldonas siajn sugestojn pri la metoda organizo de tiuj studoj: raportoj, referatoj, seminarioj, aktiva individua k kolektiva laboro de l'studantoj kun partopreno de l'gvidanto, verkado de lernolibro-skemoj, laboratoriaj studoj pri eksperimenta fonetiko ktp.

Prof. M. Sulima. La problemo pri literatura normo en la ukraina lingvo. La ukraina literatura lingvo travivas la periodon de formado, kiam mankas stabilaj k de ĉiuj agnoskitaj normoj, k la uzataj formoj varias depende de diversaj literaturistoj k gramatikistoj. Tiun staton la aŭtoro, konata ukraina lingvisto, opinias nepre likvidenda per starigo de fiksaj normoj en la literatura lingvo; la instruistaro devas helpi ĉi-rilate la lingvistojn. Estante bazita sur la popolaj dialektoj, la literatura lingvo ne devas kopii iun el ili, sed formiĝi kiel artefarita, konscie selektita sintezaĵo tutnacia. La ĉefaj kriterioj por la selekto estu: uzatesto k natureco en la popolaj idiomoj, konformo el la vidopunkto de lingva progreso, uzatesto k neceso en la literaturo. Plue la aŭtoro priparolas la plej aktualajn problemojn de ortografio, ortoepio, akcentologio ktp. Tuŝante la sintakson, li konstatas, ke ĝi estas tro malmulte pristudita science k tial ĝi ne estas proksimtempe normigebla. En la leksiko k semantiko necesas enkonduki severajn normojn k kontrbatali necesajn k netaŭgajn vorto-kreaĵojn. — La artikolo estas ilustrita per ekzemploj.

## KINO K KLERIGO EN LA OKCIDENTO

Evarist Wouters. La kino-problemo en la okcidenta lernejo. Konsiderante kinon kiel elementon, kiel instrumenton de l'moderna pedagogia tekniko, la aŭtoro, nia Antwerpen-a korespondanto, vidas ties valoron en ĝiaj allogivo, natur-konformesto k emocivo k konstatas la avantaĝojn de kino kompare kun diapozitivo (senmova lumbildo). Analizinte plue la problemon, ĉu enklasa kino aŭ centra stud-kinejo, li konkludas, ke la una estas pedagogie pri valora dum la dua — praktike pli realigebla k tial nun pli akceptata. Post konciza priskribo de l'teknika aranĝo de centra stud-kinejo, la aŭtoro detale priparolas la didaktikon de perkina instruado (programo, rolo de l'instruisto, organizo de perkina leciono, gvido de centra stud-kinejo ktp.). Fine estas priskribataj la realigoj ĉi-rilataj en Francio, Ĉeĥoslovakio, Svisio, Germanio, Danio, Norvegio, Belgio, Holando k Usono (en la lasta nur 6800 lernejoj el 38000 ne uzas kinon!). En sia postparolo la aŭtoro substrekas la valoron de kino kiel propagilo de produktadaj labor-procedoj k internaciigilo; li finas per bondeziroj de sukceso por perkina klerigado en Sovetio.

Célestin Freinet. Kino en la francia elementa lernejo. Post kelkaj antenotoj pri la eduka valoro de kino en lerneja k eksterlerneja klerigado, la aŭtoro, nia francia kunlaboranto, detale raportas pri la tiea stato de l'afero. El la aparatoj uzataj por lerneja kino la plej taŭga k malkara estas Pathé-Baby. Sed la plej grava estas la prifilma problemo. Ekzistas pluraj filmotekoj (Centra Ŝtata, de Pathé-Baby, regionaj k. a.) k ili estas facile atingeblaj por la instruisto; nun la avangarda instruistaro kreas propran kooperan filmotekon. Entute funkcias nun ĉ. 2000 lernejaj kino-aparatoj grand- k malgrand-modelaj. La lernejadministrantaro stimulas enkodukon de kino, k la ŝtato k municipalitoj subvencias tiajn iniciatojn; tamen reakciaj lokaj aŭtoritoj ofte malhelpas. La pedagogiaj progresoj de perkina instruado ne estas grandaj, ĉar mankas taŭgaj filmoj k konforma tekniko; tion la aŭtoro pruvas per analizo de l'cirkulantaj filmoj por lerneja k eksterlerneja klerigo. En la lasta ĉapitro, parolante pri la progresiga valoro de kino en edukado, li tamen atribuas

al ĝi nur helpan rolon, similan al tiu de libro sed pli vastan k esence internacian.

Mark Starr — G. Filipov. Kino en la brita lernejo. La artikolo de nia London-a korespondanto, prilaborita de nia Ĥarkov-a kunlaboranto, prezentas koncizan skizon pri ĉi-temo. La enkonduko de kino-filmo en lernejo travivas nur propagandan periodon en Britio. Ĝenerale, kino estas tre populara en la lando, sed speciale porinfana kino ne jam estas kreita, k la lernej-aŭtoritoj ĝis nun ne zorgas pri ĝi. Nur lastatempe ŝanĝiĝas la malŝata rilato de l'edukistaro al kino dank'al la produktado de la „Brita Instru-Filmo“ atinginta jam 155 filmojn diversfakajn. La enhavo de ĉi-filmoj estas plejparte imperiisma k burĝeklaseca, sed ilia teknika nivelo estas tre alta. Dank'al intensa propagando de la B. I. F. kino ekpenetras la edukadon, sed la metodoj por ties pedagogia eluzo ne jam estas ellaboritaj. Notinda estas sukcesa iniciato de iu lernejo (Altrincham) mem produkti instru-filmon.

Hermann Schneller. Lumbildo en la germania lernejo. Nia Leipzig-a korespondanto informas, ke lumbildo (komence senmova, poste—kunmova) estis praktikata en la germania lernejo jam en la fino de l'XIX^a^ jc., sed pli larĝa uzo venis nur en la XX^a^. Dum longa tempo la pedagogoj malamike rilatis al kino, ĉar miseduka filmo estis reganta. Nur depost 1905—07 filmo decide ekpenetris lernejon. Dum la mondmilito la produktado de kulturfilmoj atingis grandajn progresojn k dum 1919-25 jam 73 instru-filmoj da 314.818 metroj longaj estis aprobitaj por lerneja uzo. Funkcias nun jam centoj da kino-teatroj por kultur-filmo. En Berlin troviĝas Ŝtata Kino-Oficejo (filmoteko), kino-fako ĉe la Centra Instituto por Edukado k Instruado k speciala kino-seminario; ili zorgas enkonduki perkinan instruadon k konforme prepari instruistojn. Landaj registaroj k urbaj municipalitoj favoras tiun agadon, k nun diversloke funkcias ĉ. 200 lumbild-oficejoj. En kelkaj urboj ekzistas specialaj stud-kinejoj porlernejaj, kiujn privataj kinej-posedantoj furioze kontrbatalas. En la kamparoj lokaj instruistoj ofte gvidas la film-demonstradon. Ĝenerale, la progresoj de l'kinofilmo en la germania lernejo estasespe rigaj.

## KRONIKO

Tra Sovet-Ukrainio: Narkompros pri metodoj de fizika influo. Kongresoj k konferoj de l'Narkompros en 1927—28. Konkurso pri la plej bonaj edukejoj k junpioniraj taĉmentoj. Konkurso pri la plej bona infanĝardeno. Laboro de regionaj komisiitaroj por aferoj de junaj kulpuloj. Normigo de l'instruista laborŝarĝo. Abono „Laborista'n Instruado'n“ por bibliotekoj de pedagogiaj superlernejoj. Aĉeto de akcioj de l'S-to por produktado de peraspektaj instruiloj. Tutsovetia kongreso de judaj kulturlaboristoj. Centraj korespondaj kursoj de ukrainoscio. Pri la jubileo de Kocjubinski.

Tra Sovet-Unio: Novaj reguloj por lernej-ŝanĝo k absolvo. Cirkulletero de la C. K. de l'K. P. pri kontrbatalo infan-senprizorgeston. Konferoj pri problemoj de komunista infanmovado k lernejo. Kino en pedagogiaj teknikumoj. Preparo de scienclaboristoj pri pedagogio. Laboristaj universitatoj en RSFSR. Kamparulaj kursoj.

Eksterande: VI^a^ internacia kongreso pri desegnarto.—Britio. Notoj pri la brita edukada vivo.—Belgio. Batalo por la laika lernejo.—Francio. La problemo pri analfabetoj.—Germanio. Gepatraj konsilantaroj en Saksio. La K. P. k supera lernejo.—Svedio. Problemoj de lernej-reformo.—Bulgario. Atenco de l' klerikula reakcio kontr la lernejo.—Usono. Aktiva lernejo en New-York.

## BIBLIOGRAFIO

La rubriko enhavas revuon de l'okcident-eŭropa pedagogia gazetaro por oktobro—decembro 1927 (estas referita pri 7 gazetoj diverslingvaj; la ĉefaj temoj: „libero en edukado“ k... bastono, soveta pedagogio, junularo k protekto al ĝi), 17 recenzojn pri novaj gazetoj k libroj rus- k ukrainlingvaj (socia edukado de infanoj—8, klerigado de adoltuloj—5, lernolibroj—2, diversaĵoj—2) k kronikon de l'edukada literaturo (estas enregistritaj 63 sovetaj eldonaĵoj aperintaj dum marto: 35 ukrain-, 24 rus- k 4 alilingvaj).

Перша друкарня Державного Видавництва України ім. Г. І. Петровського

Укрголовліт № 93/ж. 21/VI 1928. Зам. № 1613. Тираж 1270.

KUL